

# LA SUNO HISPANA \*



S-ro LUDOVIKO MONCADA  
Generalo de Divizio, Prezidanto de la Grupo de  
Valencio.

## Esperantista Organiza Komitato

CIRKULERO 4.<sup>a</sup>

### I. Pri la Protokolo de la Unua Kongreso.

Per la helpo de la Esperantista Centra Officejo, la Organiza Komitato publikigis broŝureton, kiu enhavas la oficialan protokolon de la kunsidoj de la Unua Kongreso de Esperanto de *Boulogne-sur-Mer*, kaj la nomaron de la membroj de ambaŭ oficialaj provizoraj komitatoj. Tiun broŝureton ni sendas kun tiu cirkulero, al ĉiuj membroj de ambaŭ komitatoj, al la societoj esperantistaj. (I)

(I) Ni ĝin ricevis kaj dankas.

## Comité Esperantista de Organización

CIRCULAR 4.<sup>a</sup>

### I. Protocolo del Primer Congreso.

Con ayuda de la Oficina Central Esperantista, el Comité de Organización ha publicado un folletito que contiene el protocolo oficial de las reuniones del primer Congreso de Esperanto de *Boulogne-sur-Mer*, y la relación de los miembros de ambos Comités oficiales provisionales. Ese folletito lo enviamos con esta circular a todos los miembros de ambos comités, a los periódicos y a las Sociedades esperantistas (I).

(I) Lo hemos recibido y lo agradecemos.

## II. Pri la organizo de la Dua Kongreso.

La Organiza Komitato sciigas, ke, laŭ la komisiono donita de la kongreso de *Boulogne-sur-Mer*, kaj post enketo al diverslandaj grupoj esperantistaj, ĝi decidis unuvoĉe, akcepti la inviton de la Svisa Esperantista Societo, por kunveni la venontan kongreson en Svisujo.

Konsente kun tiu societo, kaj kun la Grupo Esperantista en Genevo ĝi komisiis al tiu lasta grupo la taskon fondi lokan komitaton, por helpi la organizadon de la kongreso, en tiu lasta urbo.

Tiu loka komitato devos sin okupi, post interkonsento kun la Organiza Komitato, pri la starigo de la parto de la programo, kiu koncernas la festojn, ekskursojn kaj akceptojn, kiuj estos enmetotaj en la kongresaj tagoj, rezervante sufiĉan nombron da kunsidoj por la laboroj de la kongreso.

La Organiza Komitato, kunsente kun la Lingva Komitato, prilaboros la programon de tiuj kunsidoj. Ili esploras nun la demandojn kiuj estos prezentataj al la diskutoj de la Kongreso.

La Organiza Komitato sciigas, je la konvena momento, al la esperantistaro, per poŝtaj cirkuleroj, tiujn demandojn kaj ĉiujn detalojn pri la tuta organizo de la Kongreso de Genevo; nun ĝi nur povas sciigi, ke la epoko elektita por tiu Kongreso estos la monato Septembro, kaj ke la programo enhavos ekskursojn en Vevey kaj en aliaj svisaj urboj.

## II. Organización del Segundo Congreso.

El Comité de Organización hace saber que con arreglo al encargo recibido del Congreso de *Boulogne-sur-Mer*, y después de indagación á grupos esperantistas de diversos países, decidió por unanimidad aceptar la invitación de la Sociedad Esperantista Suiza para reunir en Suiza el futuro Congreso.

De acuerdo con esta Sociedad y con el Grupo esperantista de Ginebra, comisionó á este último grupo el trabajo de fundar un comité local para ayudar la organización del Congreso en la última ciudad.

Ese comité local deberá ocuparse, después de un común acuerdo con el Comité de Organización, de la formación de la parte del programa concerniente á las fiestas, excursiones y recepciones que serán incluidas en los días de Congreso, reservando suficiente número de reuniones para los trabajos del Congreso.

El Comité de Organización, de acuerdo con el Comité de la Lengua, formarán el programa de estas reuniones. Ahora estudian los puntos que serán presentados á la discusión del Congreso.

El Comité de Organización informará en el momento conveniente al mundo esperantista, por circulares, esos puntos y todos los detalles referentes á la total organización del Congreso de Ginebra; ahora sólo puede manifestar que la época elegida para ese Congreso será el mes de Septiembre y que el programa contendrá excursiones á Vevey y á otras poblaciones suizas.

## Grava avizo

La sufiĉego da originalo kaj la malmulta disponebla loko en nia gazeto, malpermesas al ni enpresi longajn cirkulerojn kaj konstantajn anoncojn de gazetoj. La unuajn ni presigos mallongigitajn kaj pri la duaj, la fako «Niaj vizitantoj» estas jam anonco de la gazetaro kiu honoras nin per interŝanĝo.

## Aviso importante

La abundancia de original y el poco espacio disponible de nuestra publicación, nos impide insertar largas circulares y anuncios constantes de periódicos. Imprimiremos las primeras extractadas, y respecto á las segundas, la sección «Niaj vizitantoj» es ya anuncio de la prensa que nos honra con el cambio.

## Sciigoj

**Amerikaj Unuigitaj Ŝtatoj.**—Grupoj fondiĝis en *Cambridge* kaj *Filadelfio*.

**Anglujo.**—Grupoj fondiĝis en *Rathar*, *Dublin*, *Limerick*, *Cambridge*, *Sale*, *Manchester*, *Hilther Green* (Londono) kaj *Harrogate*.

Niaj karaj kunbatalantoj «The British Esperantist» kaj «The Esperantist», de la komenco de tiu ĉi jaro fariĝis unu sole gazeto, sub ambaŭ titoloj, sama formato, kaj enhavante ĝis 20 paĝoj. La januara numero estas bonega kaj montras brilegan estontecon. Antaŭen karaj amikoj!

**Aŭstrujo.**—En Brüml (ĉefurbo de Moravio), kolektiĝis kelkaj germanaj esperantistoj, kiuj decidis aktive propagandian karan lingvon, per paroladoj, kursoj, k. t. p. Oni aranĝos ekspozicion de ĉiuspecaj esperantaĵoj por videble prui al la nekredema publiko la grandan tutmondan disvastiĝon de Esperanto. Por plenumi la justajn dezirojn de tiuj ĉi sinjoroj, bonvolu sendi al S-ro Karlo Steir en Brüml (Moravio), Rathansgasse, 1, cirkulerojn, gazetojn, artikolojn, leterojn, ilustritajn poŝtkartojn... unuvorte, objektojn kiuj taŭgas por prui la facilecon, utilecon kaj disvastiĝon de nia kara komuna idiomo.

**Belgujo.**—Nia kunfrato «La Belga Sonorilo», en sia januara numero alportas la novaĵon enhavi en duobla kovrilo, kiuj taŭgas por propagando, la dek ses gramatikajn regulojn de Esperanto. Estas rimarkinda la malavareco de la malriĉa esperantista gazetaro.

«Journal des Instituteurs» publikigas ke la fremdaj ĝeinstruistoj, kiuj deziras korespondadi kun la «Federacio de la Belgaj Instruitoj» aŭ kun la redaktoro de la nomita gazeto, devas sendi siajn leterojn al S-ro Eugeno Mathys, filo, urba

## Noticias

**Estados Unidos de América.**—Se han fundado grupos en *Cambridge* y *Filadelfia*.

**Inglaterra.**—Se han fundado grupos en *Rathar*, *Dublin*, *Limerick*, *Cambridge*, *Sale*, *Manchester*, *Hilther Green* (Londres) y *Harrogate*.

Nuestros queridos compañeros de lucha «The British Esperantist» y «The Esperantist» se han fundido en un solo periódico bajo ambos títulos, la misma forma y conteniendo hasta 20 páginas. El número de Enero es excelente é indica un magnífico porvenir. ¡Adelante, queridos amigos!

**Austria.**—En Brüml (capital de Moravia) se reunieron algunos esperantistas alemanes que decidieron pagar activamente nuestra querida lengua por conferencias, cursos, etc. Se arreglará una pequeña exposición de toda clase de cosas esperantistas, para probar visiblemente al incrédulo público el gran desarrollo del Esperanto en todo el mundo. Para satisfacer los justos deseos de estos señores, tengan la bondad de enviar al Sr. Carlos Stein, en Brüml (Moravia), Rathansgasse, 1, circulares, periódicos, artículos, cartas, tarjetas postales ilustradas... en una palabra, objetos que puedan probar la facilidad, utilidad y esparcimiento de nuestro querido común idioma.

**Bélgica.**—Nuestro hermano «La Belga Sonorilo», en su número de Enero trae la novedad de contener en doble cubierta, que sirve para propaganda, las dieciséis reglas gramaticales del Esperanto. Es notable la generosidad de la prensa esperantista pobre.

El «Journal des Instituteurs» publica que los maestros de ambos sexos extranjeros y las ligas de instrucción de fuera de Bélgica que deseen tener correspondencia con Federación de los Maestros Belgas ó con la redacción del nombrado

instruisto Aŭgustanstrato, 5<sup>a</sup>, en Louvain (Belgujo).

**Bulgarujo.**—Ni plezurege ricevis la unuan numeron de «Unua Paŝo», bone litografita kaj verkita gazeto al kiu ni korege salutas kaj deziras longajn tagojn kaj profitajn klopodojn. Vidu anoncon en fako «Niaj vizitantoj».

**Francujo.**—La Amiens'a grupo sendas al ni cirkuleron sciigante ke dum la unua jaro tie okazos gravegan lokan kaj parte nacian ekspozicion, ke ĝi petis kaj ricevis apartan lokon por esperantista sekcio kaj ke li esperas de grupoj, de esperantaj eldonistoj kaj de esperantistoj amantoj de la propagando kaj de la disvastigo de Esperanto ke ĉiu el ili sendu kiel eble plej baldaŭ, ĉar l'ekspozicio estos malfermata la 14<sup>an</sup> de la venonta monato, al S-ro Ch. Tassencourt, du aŭ tri specimenojn de la revuoj aŭ gazetoj, unu ekzempleron de la ĉefaj esperantaj eldonaĵoj, poŝtkartojn, prospektojn aŭ ian ajn interesan esperantaĵon.

Sia vice, la Amiens'a grupo faros dum la tuta daŭro de la ekspozicio specialan aranĝon, por ke ĉiuj fremdaj esperantistoj vizitantaj ĝian urbon havu, laŭbezone, ĉe sia alveturo, samideanon el la grupo por ilin gvidi kaj akompani.

Sama grupo proponas sur alia cirkulero, ke por disvastigi Esperanton ĉe industriistoj kaj komercistoj, ĉiu grupo klopodu por ricevi el ili kiel eble plej grandan nombron da aliĝoj, kun promeso korespondadi esperante pri la komercaj aferoj. Poste, ke ĉiu grupo faru nomarojn kaj ilin sendu al ĉiu fremdlanda grupo.

S-ro Henaffe, membro de la urba konsilantaro de Parizo kaj praktika protektoro de nia afero, proponis al siaj kolegoj ke oni donu subvencion de 100 frankoj

periódico, deben dirigir sus cartas al Sr. Eugenio Mathys, hijo, maestro de la ciudad, Augustanstrato, 5, en Louvain (Bélgica).

**Bulgaria.**—Con mucho gusto hemos recibido el primer número de «Unua Paŝo», periódico bien litografiado y escrito, al cual con el mayor cariño saludamos, deseándole muchos días y provechosos trabajos. Véase su anuncio en «Niaj vizitantoj».

**Francia.**—El grupo de Amiens nos envía una circular haciendo saber que durante el año actual tendrá lugar allí una exposición local importantísima, en parte nacional, que pidió y obtuvo un local aparte para una sección esperantista y que solicita de los grupos, de los editores de Esperanto y de los esperantistas amantes de la propaganda y de la difusión del Esperanto, que cada cual envíe lo más pronto posible, porque la exposición se abrirá el 14 del próximo mes, al Sr. Ch. Tassencourt, presidente del grupo, 1, calle de Argel, dos ó tres muestras de las revistas ó periódicos, un ejemplar de las principales obras de Esperanto editadas, tarjetas postales, prospectos, ó cualquier otra cosa de Esperanto interesante.

A su vez el grupo de Amiens hará, durante la total duración de la exposición, un arreglo especial para que todos los esperantistas extranjeros que visiten aquella ciudad tengan en su excursión, para lo que necesiten, un colega del grupo para guiarlos y acompañarlos.

El mismo grupo propone en otra circular que para difundir el Esperanto entre industriales y comerciantes, cada grupo trabaje para recibir de ellos el mayor número posible de adhesiones, con promesa de llevar la correspondencia en Esperanto en los negocios comerciales. Después, que cada grupo haga listas y las mande á los grupos extranjeros.

El Sr. Henaffe, concejal del Ayuntamiento de París y práctico protector de nuestro asunto, ha propuesto á sus colegas una subvención de 100 francos á la

al Societo franca por propagando de Esperanto kaj ke oni fondu esperantajn kursojn en la superaj unua-gradaj lernejoj de la Pariza urbo.

Novaj grupoj fondiĝis en *Caen, Orleans, Cherbourg, Aix-les-Bains, Saumur, Noyers-Saint-Martin, Reims kaj Saint-Servan*.

S-ro inĝeniero M. L. Pourcines, de Nancy, faris en *Commercy* sciencegan lingvistikan paroladon kiun li finis montrante ke Esperanto estas la sola lingvo neŭtrala. La bonega laboro de la parolinto sukcesis per la tie baldaŭa komenco de esperanta kurso.

«Tra la Mondo» ion diris en ĝia 5.<sup>a</sup> numero kio malplaĉis al la hispanaj esperantistoj kaj la senkulpigoj de ĝia 6.<sup>a</sup> numero ne kontentigis la ofenditojn.

**Germanujo.**—Novajn grupojn oni kreis en *Elbing, Weiler, Wiesbaden kaj Halle*.

Nia bona amiko «Germana Esperantisto» enhavas en sia lasta numero belegajn portretojn de S-roj Cart, Meray, O'Connor, Beaufront, Boirac kaj Uitterdijk kiujn publikigos la aperonta Albumo de eminentaj esperantistoj, de S-ro Schuck, vendota ĉe la eldonanto Braunschweig, Thomaestrasse, 16.

**Hungarujo.**—Fondiĝis esperantistaj grupoj en *Versacs kaj Debreszen*.

Ni ricevis januaran numeron de «Esperanto», bone verkitan kaj bone ilustritan revuon esperantistan kiu publikigis en Budapeŝto. Ni plezure rekomendas ĝin al niaj legantoj.

**Kanado.**—En *Winipeg'o* fondiĝis esperantista grupo.

**Norvegujo.**—En *Kristian'o* oni fondis societon titolitan «Societo de Danaj kaj Norvegaj esperantistoj».

**Venezuelujo.**—La semajna gazeto «El Dominical», el Karakas'o, dediĉas fakon por Esperanto, kie S-ro George O. Messerly komencis de numero de la 12<sup>a</sup> No-

Sociedad francesa para propagación del Esperanto y que se funden cursos de Esperanto en las escuelas superiores de primer grado de la ciudad de París.

Se han fundado nuevos grupos en *Caen, Orleans, Cherbourg, Aix-les-Bains, Saumur, Noyers-Saint-Martin, Reims y Saint-Servain*.

El señor ingeniero M. L. Pourcines, de Nancy, ha hecho en *Commercy* un discurso lingüístico extraordinariamente científico, que concluyó demostrando que Esperanto es la única lengua neutral. El magnífico trabajo del orador ha tenido el éxito de que pronto se empezará allí un curso de Esperanto.

«Tra la Mondo» dijo en su 5.<sup>o</sup> número algo que disgustó a los esperantistas españoles, y las disculpas de su número 6.<sup>o</sup> no satisficieron a los ofendidos.

**Alemania.**—Se han creado nuevos grupos en *Elbing, Weiler, Wiesbaden y Halle*.

Nuestro buen amigo «Germana Esperantisto» contiene en su último número magníficos retratos de los Sres. Cart, Meray, O'Connor, Beaufront, Boirac y Uitterdijk, los cuales publicará el Album de esperantistas eminentes del Sr. Schuck, que se venderá en casa del editor Branuschweig, Thomaestrasse, 16.

**Hungría.**—Se han fundado grupos esperantistas en *Versacs y Debreszen*.

Hemos recibido un número de Enero de «Esperanto», bien escrita y bien ilustrada revista que se publica en Budapeŝto. Tenemos el gusto de recomendarla a nuestros lectores.

**Canadá.**—Se ha fundado un grupo esperantista en *Winipeg*.

**Noruega.**—En *Christiania* se ha fundado una sociedad titulada «Sociedad de Daneses y Noruegos Esperantistas».

**Venezuela.**—El semanario «El Dominical», de Caracas, dedica una sección al Esperanto, en la que el Sr. George O. Messerly ha empezado desde el núm. 12

vembro klarigon de nia gramatiko. Ni salutas kaj gratulas la kleran apostolon de Esperanto en tiu bela lando.

**Hispanujo.**—La Komerca Ĉambro de *Burgos* o ĝentile kaj montrante sian klarecon kaj progresemon, akceptis la fariĝon de kurso Esperanto en sia loĝejo, kiun malfermis la 15<sup>an</sup> tagon de tiu ĉi monato, la lerta esperanta profesoro S-ro Manuel Esteban.

Estis nomata urbestro de *Cardona* nia respektinda samideano S-ro Enrique Rosich. Ni gratulas tiun S-ron kaj speciale la Cardonajn urbanojn kaj la tian grupon esperantistan kiu havos gravan oficialan protekton.

Pastro skolapia Bruno Rodríguez ĵus publikigas en la ĉiusemajna gazeto de *Tarrasa*, «Egara», interesajn artikolojn sub la titolo «Un curso de Esperanto», laŭdante nian karan lingvon por belegaj frazoj. Tiu ĉi S-ro varma esperantisto, faras tie gravegan propagandon per paroladoj en «Junularo Katolika», senĉesajn verkojn en la tieaj gazetoj kaj esperantaj kursojn.

La ĵurnalo «El Liberal» (el *Murcia*), publikigas en malsamaj tagoj, belajn artikolojn pri Esperanto, de S-roj Codorniu kaj Martinez Teruel.

«La Verdad» (el *Murcia*), sub la titolo «Notas Esperantistas», enhavas bonan verkon ankaŭ de S-ro Codorniu.

Niaj kunbatalantoj el *Korunjo* daŭrigas senlace sian disvastigan klopodadon. Tiel elmontras ĝin la ekskurso elfarita de la fervoregaj esperantistoj S-roj Romualdo González kaj M. Monteagudo en kelkajn urbojn de tiu provinco. El *Korunjo* aliris la propagandistoj en *Vigo*, kie la gazetaro kaj la amikoj antaŭ preparis la publikan opinion. Ili faris paroladon ĉe Gimnasio, la tiea plej grava societo, al kiu estis prezentataj de S-ro Alonso Cuenca, sekretario de la dirita societo. La sukceso estis bonega. Baldaŭ fondiĝos grupo.

La ekskursistoj iris al *Villagarcía*

de Noviembre una explicación de nuestra gramática. Saludamos y felicitamos al instruído apóstol del Esperanto en aquel bello país.

**España.**—La Cámara de Comercio de Burgos, atentamente y demostrando su ilustración y amor al progreso, ha aceptado que dé un curso de Esperanto en su domicilio, que comenzará el 15 de este mes, el diestro profesor esperantista D. Manuel Esteban.

Ha sido nombrado alcalde de *Cardona* nuestro respetable colega en ideas D. Enrique Rosich. Felicitamos á este señor, y especialmente á los ciudadanos de Cardona y á aquel grupo esperantista, que tendrá importante protección oficial.

El Padre escolapio Bruno Rodríguez acaba de publicar en el semanario de *Tarrasa*, «Egara», interesantes artículos con el título «Un curso de Esperanto», alabando nuestro querido idioma con hermosísimas frases. Este señor, ardiente esperantista, hace allí importantísima propaganda por medio de conferencias en la Juventud Católica, continuos escritos en aquellos periódicos locales y cursos de Esperanto.

El diario «El Liberal» (de Murcia) publica en distintos días bellos artículos sobre el Esperanto de los Sres. Codorniu y Martínez.

«La Verdad» (de Murcia), bajo el título «Notas esperantistas», contiene un buen trabajo también del Sr. Codorniu.

Nuestros compañeros de lucha, de *Coruña*, continúan sin descanso su trabajo de difusión. Así lo demuestra la excursión que han hecho los fervosísimos esperantistas Sres. Romualdo González y Monteagudo á algunas ciudades de aquella provincia. De Coruña fueron los propagandistas á *Vigo*, donde la prensa y amigos habían preparado con anticipación la opinión pública. Hicieron un discurso en el Gimnasio, la sociedad más importante de allí, á la que fueron presentados por el Sr. D. Alonso Cuenca, secretario de dicha sociedad. El éxito fué magnífico. Pronto se fundará un grupo.

Los excursionistas pasaron á *Villa-*

sed pro manko da tempo preskaŭ nenion faris tie pri nia afero, kaj alvenis poste en *Santiago* kie ili estis rekonataj per la *verda stelo*, de S-roj Carro García (fratoj), Porta Garate, Pérez Alvarez kaj Domínguez, studentoj. Tri paroladoj estis fari-taj en tri malsamaj societoj: 1.<sup>a</sup> Ateneo Leon XIII. 2.<sup>a</sup> Patronato Obrero. 3.<sup>a</sup> Unión Artística. Ni tutkore gratulas sinjorojn propagandistojn pro la fruktodona sukceso kaj sendas la plej dankemajn salutojn al la novaj esperantistoj de *Vigo* kaj *Santiago*.

S-ro Marko Lliró, pastro skolapia kaj S-roj Juan kaj Manuel Camps, Lagarriga, Altayó, Piferrer kaj Castellá, tre klopodas en *Sabadell* por la disvastigo de Esperanto kaj intencas la kreon de grupo esperantista.

La estraro de *Valencia* grupo estis reformita jenmaniere: Prezidanto, Lia Moŝto S-ro Generalo Moncada; vicprezidantoj, S-roj Ayza kaj Inglada; kaŝistokalkulisto, S-ro Pastro Guinart; bibliotekisto, S-ro Jimenez Loira; sekretario, S-ro Duyos; voĉdonantoj: S-roj Domingo, Fabre, García Puchol, García Oltra, Lluna, Piñó kaj Sánchez Ocaña.

En *Santiago* kolektiĝis la tieaj esperantistoj kaj kreis grupon titolitan «Grupo de Kompostelo». Estis nomataj: honora prezidanto, D-ro Zamenhof; honora vicprezidanto, S-ro Gil Villanueva, rektoro de la Universitato; prezidanto, sinjoro Santaló; kasisto, S-ro Pérez Alvarez; kalkulisto, S-ro Carro (Santiago); voĉdonantoj: S-roj Prul kaj Monteiro. Niajn gratulaĵojn kaj korajn salutojn al niaj novaj Santiag'aj samideanoj.

Laŭtenanto colonelo staba S-ro Ayza faris en la Malnova *Castellon'a* Casino, antaŭ multaj kaj gravaj personoj, rimarkindan paroladon pri Esperanto kiu meritis aplaŭdojn de la ĉeestantoj kaj laŭdojn de la tiea gazetaro. Oni esperas favoran rezultaton de la laboro de nia kara amiko, kun el la plej fervoraj apostoloj de nia bona afero en Hispanujo.

*garcía*, pero por falta de tiempo casi nada hicieron allí en pro de nuestra causa, y marcharon luego á *Santiago*, donde fueron reconocidos por la *verde estrella*, de los Sres. Carro García (hermanos), Porta Garate, Pérez Alvarez y Domínguez, estudiantes. Tres discursos se pronunciaron en tres distintas sociedades: 1.<sup>a</sup> Ateneo León XIII. 2.<sup>a</sup> Patronato Obrero. 3.<sup>a</sup> Unión Artística. De todo corazón felicitamos á los señores propagandistas por el fructuoso éxito, y enviamos los más agradecidos saludos á los nuevos esperantistas de *Vigo* y *Santiago*.

El P. Marcos Lliró, escolapio, y los Sres. Juan y Manuel Camps, Lagarriga, Altayó, Piferrer y Castellá, trabajan mucho en *Sabadell* por la difusión del Esperanto é intentan la creación de un grupo esperantista.

La Junta Directiva del grupo de *Valencia* ha sido reformada del modo siguiente: Presidente, el Excmo. señor general Moncada; vicepresidentes, los señores Ayza é Inglada; contador-cajero, Rev. P. Guinart; bibliotecario, Sr. Jiménez Loira; secretario, Sr. Duyos; vocales, señores Domingo, Fabre, García Puchol, García Oltra, Lluna, Piñó y Sánchez Ocaña.

En *Santiago* se reunieron los esperantistas de allí y crearon un grupo titulado «Grupo de Kompostelo». Fueron nombrados: Presidente honorario, el doctor Zamenhof; vicepresidente honorario, Sr. Gil Villanueva, rector de la Universidad; presidente, Sr. Santaló; secretario, Sr. Porta; tesorero, Sr. Pérez Alvarez; contador, Sr. Carro (Santiago); vocales, Sres. Prul y Monteiro. Nuestras felicitaciones y cariñosos saludos á nuestros nuevos *samideanos* de Santiago.

El teniente coronel de Estado Mayor, Sr. Ayza, ha dado en el «Casino Antiguo» de *Castellón*, ante muchas é importantes personas, una notable conferencia sobre el Esperanto, que mereció aplausos de los presentes y alabanzas de aquella prensa local. Se espera favorable resultado del trabajo de nuestro querido amigo, uno de los más fervorosos apóstoles de nuestra buena causa en España.

Okaze de tiu ĉi parolado, S-ro Victorino Aparici verkis en «El Clamor», de *Castellón'o*, bonegan kaj entuziasman artikolon pri Esperanto varbante adeptojn kaj proponante baldaŭnan kreon de grupo en tiu bela ĉefurbo. Antaŭen, S-ro Aparicio, kaj disponu de ni!

En generala kunveno okazinta en *Valencio* por anstataŭi la estraron de Hispana Societo por propagando de Esperanto, estis nomitaj: prezidanto, sinjoro Codorniu; vicprezidantoj, S-roj Inglada kaj López Villanueva; kasisto, S-ro Fabre; sekretario, Riv. P. Guinart; voĉdonantoj, S-roj Ayza, Benavente, Duyos, García Oltra, Jiménez Loira kaj Monteagudo.

En *Barcelono* kreskas la esperanta movado, laŭ diras al ni tiea samideano. Krom la kurso farita de S-ro Montaner ĉe l'Ateneo Enciclopediko Popular, faras aliajn S-ro Rosales en Societo «Progreso» kaj S-ro Bonet ĉe la «Centro de Dependientes de Comercio».

La ĉiusemajna gazeto «Joventut» dediĉas en ĉiu numero dupaĝan fakon al propagando de Esperanto.

Ankaŭ la konata esperantisto S-ro Jacinto Bramon, nia kunredaktoro kaj kara amiko, faris paroladon en «Akademio Scienca, Literatura, Amuza, de Sankto Tomaso, kiun bonegan laboron estis kronata je grandaj aplaŭdoj, gratulaĵoj kaj la kreo de esperanta kurso de li farota.

Con ocasión de esta conferencia, D. Victorino Aparici ha escrito en «El Clamor», de *Castellón*, un magnífico y entusiasta artículo referente al Esperanto, reclutando adeptos y ofreciendo crear pronto un grupo en aquella bella capital de provincia. ¡Adelante, Sr. Aparicio, y disponga usted de nosotros!

En la junta general habida en *Valencia* para sustituir la Directiva de Hispana Societo para la propaganda del Esperanto, fueron nombrados: presidente, el señor Codorniu; vicepresidentes, señores Inglada y López Villanueva; cajero, señor Fabre; secretario, Rev. P. Guinart; vocales, Sres. Ayza, Benavente, Duyos, García Oltra, Jiménez Loira y Monteagudo.

En *Barcelona* crece el movimiento esperantista, según nos manifiesta un compañero de allí. Además del curso que da el Sr. Montaner en el Ateneo Enciclopédico Popular, dan otros los Sres. Rosales en la sociedad «Progreso», y el Sr. Bonet en el «Centro de Dependientes de Comercio».

La revista semanal «Joventut» dedica en todos los números una sección de dos páginas a la propaganda del Esperanto.

También el conocido esperantista don Jacinto Bramon, nuestro compañero de redacción y querido amigo, dió una conferencia en la «Academia Científica, Literaria, Recreativa, de Santo Tomás», cuya magnífica labor fué premiada por grandes aplausos, felicitaciones y la creación de un curso de Esperanto que él dará.

## La tri amikoj

Homo havis tri amikoj: el ili, du speciale, estis al li tre karaj; la alia estis por li kvazaŭ neamiko, malgraŭ ke de tiu ĉi li estis tutkore amata.

Unu tagon, li estis alvokita al la juĝejo. Kiu el vi—li diris al siaj amikoj—volas veni kune kun mi kaj esti mia favora atestanto?, ĉar mi estas gravege kulpigita.

La unua el liaj amikoj diris tuj al li

## Los tres amigos

Un hombre tenía tres amigos: dos de ellos, en particular, le eran muy queridos; el otro le era indiferente, á pesar de amarle éste entrañablemente.

Un día se le llamó al juzgado. ¿Quién de vosotros—dijo á sus amigos—quiere venir conmigo y deponer en mi favor?, pues pesa sobre mí una acusación muy grave.

El primero de sus amigos dijo al ins-



ke li ne povas akompani lin, ĉar li havis aliajn aferojn por fari: la dua sekvis lin ĝis la pordoj de la juĝista palaco; tie li haltis kaj returnis sin malantaŭen: la tria, pri kiu li estis malpli konfidinta, eniris kun li en la juĝejon, li favorege parolis por li kaj li atestis lian senkulpecon kun tia elokventa konvinkeco ke la juĝisto lin absolvis.

Ĉiu homo havas ankaŭ en tiu ĉi mondo tri amikojn: kiel ili kondukas en la mortthoro, kiam Dio alvokas lin al sia tribunalo?

La mono, la plej kara el liaj amikoj, lasas tuj lin kaj ne kuniras kun li.

Liaj parencoj kaj liaj amikoj sekvas lin ĝis la tombejaj pordoj kaj ili poste sin returnas hejmen: la tria lin akompanas ĝis la trono de la Ĉiopova Juĝisto: tiu ĉi amiko estas, kompreneble, liaj bonaj agoj: ili lin antaŭiras, ili favore parolas por li, ili lin pravigas se ili estas multnombraj kaj faritaj laŭ bonaj celoj.

La franca lingvo tradukis FRANCISCO DOMINGO

tante que no podía acompañarle porque tenía que evacuar otros asuntos; el segundo le siguió hasta las puertas del palacio de justicia; allí se detuvo y volvió sobre sus pasos: el tercero, aquel con quien menos había contado, entró con él en el juzgado, depuso en su favor y demostró su inocencia con tal convicción y elocuencia, que el Juez lo absolvió.

Todo hombre tiene también en este mundo tres amigos: ¿cómo se conducen ellos en la hora de la muerte, cuando Dios le llame ante su tribunal?

El dinero, el más predilecto de sus amigos, le abandona desde el primer momento y no va con él.

Sus parientes y amigos le siguen hasta las puertas del cementerio, y cada uno regresa después á su casa; el tercero, le acompaña hasta el trono del Soberano Juez: este amigo, como fácilmente se comprende, son sus buenas obras: ellas le preceden, interceden en su favor y le justifican si han sido numerosas y hechas con rectos fines.

Lo tradujo del francés FRANCISCO DOMINGO

## Anekdoto

Barono de Thun, kiu estis longtempe je fino de la jarcento XVIII<sup>a</sup>, ministro de Wurtemberg en sia naska vilaĝo en Pomeranio kaj ne lasante moneron kiel heredaĵon al la sia nevo, li rekomandis por spari elspezojn al sia heredonto, distranĉi sian propran korpon pekli siajn pecojn, enmeti ilin en barelo kaj enŝipigi spare en la unuan ŝipon forirontan Pomeranio'n. Oni faris tion. Dum la mariro la ŝipistoj vizitis la barelon kaj kredinte ke tiu ĉi enhavis peklan bovaĵon ili manĝis la duonon de barono de Thun. Lia nevo, kiu rakontis l'anedkoton al la barono de Gleichen, aldonis: «Mi nur povos preĝi pri mia onkloduono».

*Esperantigis R. AYZA.*

## Anécdota

El barón de Thun, que era desde largo tiempo, al finar el siglo XVIII, ministro de Wurtemberg en París, queriendo ser enterrado en el pueblo de su nacimiento, en Pomerania, y no dejando dinero en herencia á su sobrino, recomendó para ahorrar gastos á su heredero despedazase su cuerpo, salase los pedazos, los metiese ó colocase en un barril y lo embarcase económicamente en el primer vapor que saliera para Pomerania. Así se hizo. Durante la travesía, los marineros visitaron el barril, y habiendo creído que éste contenía cecina, se comieron la mitad del barón de Thun. Su sobrino, que contó la anécdota al barón de Gleichen, le decía: «Ya solamente podrá rezar por mi medio tío».

## Spritajo

Sinjorino al sia edzo:

—Se vi trovus la rimedon ke Gonzalez venu ofte ĉe nin...

Li estus bonega fianĉo por nia filino!

La filo (studento):—Mi havas jam la sistemon, patrineto: mi pruntepetos al li dudek pesetoj kaj li ne malestos eĉ unu tagon en nia domo.

HIGINIO V. AMEJEIRAS

Prezidanto de la Grupo Esperantista de  
Barco de Valdeorras.

## Ocurrencia

Una señora á su marido:

—Si tú encontraras el medio de que González viniera con frecuencia á casa...

¡Sería un magnífico novio para nuestra hija!

El hijo (estudiante):—Ya tengo el sistema, mamáita: le pediré prestadas doce pesetas, y ni un día faltará de nuestra casa.

HIGINIO V. AMEJEIRAS

Presidente del Grupo Esperantista de  
Barco de Valdeorras.

## PROBLEMOJ

I

Ŝanĝu naŭfoje la unuan literon de vorto kaj vi ricevos la sekvantajn nomojn.

1—Bruo.

2—En leteroj.

3-4—Du malamikaj bestoj.

5—Metalo.

6—Ŝirmilo kontraŭ malvarmo.

7—Kuirejilo.

8—Manĝegema malvirtulo.

9—Estimo.

10—Interplenigo.

II

Admiro	m	m	m	m
	m	m	m	m
	m	m	m	m
	m	m	m	m

III

Pasero, najtingalo, kondoro, hirundo turto, oriolo.

El ĉiu el tiuj ĉi birdnomoj elprenu po unu litero; kaj laŭvice kunmetante la elektitajn literojn vi ricevos alian nomon de birdo.

L. M.

## La Espero

(Chateaubriand.)

Ekzistas en la ĉielo unu dipotenco, senĉesa kolego de la religio kaj de la virto. Si al ni helpas elporti la vivon. Si enŝpiĝas por montri al ni la havenon dum la ventegoj; egale dolĉa kaj certa por la gloraj vojaĝantoj kiel por la nekonataj pasaĝeroj. Tamen kvankam ĝiaj okuloj estas kaŝitaj per rubando, ĝiaj rigardoj enpenetraj l'estontecon; kelka-

## La Esperanza

(Chateaubriand.)

Hay en el cielo una divina potencia, incesante compañera de la religión y de la virtud. Ella nos ayuda á soportar la vida; se embarca para enseñarnos el puerto durante las tempestades; igualmente dulce y veraz, tanto para los ilustres viajeros como para los desconocidos pasajeros. Sin embargo, aunque sus ojos están tapados por una venda, sus mira-

foje ĝi havas florojn, kiuj naskiĝas en ĝiaj manoj, alfoje pokalon plenan je ĉarma likoro; nenio alproksimiĝas al la ĉarmeco de ĝia voĉo al la gracieco de ĝia rideto; ju pli oni antaŭeniras al la tombo, des pli ĝi montriĝas pura kaj brilanta por la konsolitaj mortontaj. La Fido kaj la Bonfarado diras al ĝi «Mia fratino». Ĝi nomiĝas «Espero».

Tradukis el la franca lingvo R. AYZA.

das penetran en lo porvenir; algunas veces tiene flores que nacen en sus manos; otras es copa llena de encantador licor; nada se aproxima al encanto de su voz, á la gracia de su sonrisa; cuanto más se aproxima uno á la tumba, tanto más ella se muestra brillante á los consolados mortales. La Fe y la Caridad la llaman «su hermana». Se denomina «la Esperanza».

## Korespondada fako de "La Suno Hispana,"

### SINJOROJ:

J. B. M., Barcelono.—Diras l'aŭtoro, ke kiam oni faras tradukon, oni povas por montri ĝin, uzi aŭ ne almovan akuzativon. Oni povas diri: tradukis en Esperanto kaj Esperante aŭ en Esperanton kaj Esperanten. En la unua okazo oni volas esprimi la farigon de la traduko, tute ne aludante almovon; en la dua, oni celas montri ke la tradukita teksto transiris el sia propra lingvo, en la esperantan. Sekve oni povas logike akcepti uzon de almova akuzativo.

G. N., Málaga. — F. A., Barcelona. — E. L., Le Bouchet (Francujo). — S. V., Cuevas de Almadén. — L. A., Algemésí. — J. F., Huelva. — J. V., Huelva. — C. B., Valencia. — H. D., Cabañal. — F. E., Sestao. — J. A., Puentecaldelas. — J. C., Barcelona. — T. E., Bilbao. — Th. L., Rouen (Francujo). — J. L., Paris. — D-ro S., Nantes (Francujo). — L. C., Cartagena. — E. G., Mahón. — Rev. J. G. M., Ubeda. — F. A., El Royo. — G. E., Besancon (Francujo). — L. P., Nancy (Francujo). — F. E., Madrid. — J. L., Bilbao. — N. M., Aguilas. — E. M., Sierra Engarcerán. — A. J., Manila (Filipinas). — C. C., Tembleque. — J. B., Barcelona. — J. A., Madrid. — J. A., Valencia. — B. M. M., Madrid. — R. G. de M., Madrid. — P. M., Madrid. — L. G., Roma. — A. K., Odessa (Rusujo). — J. B., Granada. — F. G. de S., Toledo. — R. p. M. Ll., Sabadell. — A. Z., Genevo (Svisujo). — A. Ph., Noyers St. Martin (Francujo). — J. A.-T. B.-Fr. C.-M. D.-M. H.-V. L.-G. O.-Fr. R. R.-R. R.-M. T., Valencia.

Mi ricevis viajn abonpagojn. Dankon.

Kore salutas Vin,

A. F. L.

## NIAJ VIZITANTOJ

Dec. 1905 Jan. 1906.—**Espero Katolika.** A Sainte Radegonde prés *Tours (Indre et Loire, Francujo)*. Jarabono, 2,50 fr.

N.º 26.—**Antaŭen Esperantistoj!!** Lartiga, 106, *Lima (Peruo)*. Jarabono, 3 frankoj.

N.º 2 kaj 3, IIIª jaro, 1905.—**Juna Esperantisto.** 9, avenue des Vollandes, *Genevo (Svisujo)*. Jarabono, 2 fr.

1-16 Jan. 1906.—**Museo Exposición.** Medina, 37, *Alicante*. Jarabono, 5 pesetoj.

Sep.-Okt. 1905.—**La Meksika Lumturo.** *Sta. Rosa, Necoxtla, Veracruz (Meksikujo)*. Jarabono, 3 fr.

Okt.-Nov.-Dec. 1905.—**Svisa Espero.** 6, vieux College, *Genevo (Svisujo)* Jarabono, 2,50 frankoj.

- Jan. 1906.—**Germana Esperantisto**. Prinzentrasse, 95, *Berlin S.* (*Germanujo*). Jarabono 3 markoj.
- 5-22 Jan. 1906.—**La Alĝeria Stelo**. 57, rue d'Isly, *Alĝer* (*Alĝerujo*). Jarabono, 3 fr. N.º 79, 82 kaj 84.—**La Revue de l'Esperanto en Le Cicerone**. 102, rue de la Paix, *Boulogne sur-mer* (*Francujo*). Jarabono, 10 fr.
- Jan. 1 1906.—**Lingvo Internacia**. 33, rue Lacedéde. *Paris*. Jarabono, 5 fr. Kun literatura aldono 7 fr. 50.
- Jan. 1906.—**Ruslanda Esperantisto**. S. Petersburgo, Bolš. Podjačeskaja, 24 *Rusujo*. unu numero 30 kopekojn.
- N.º 4.—**Gefratato Esperanta**. Napolo, Largo Gesu e Mario, n.º 4. *Italujo*. Jarabono, 4 fr.
- 14-28 Jan. 1906.—**Esperanto**. Ceret, 4. Pir. Or. *Francujo*. 24 numeroj sinsekvaj, 3 frankoj.
- Jan. 1906.—**La Belga Sonorilo**. S-ro J. Coox, Duffel, *Belgujo*. Jarabono, 4 fr.
- N. 3, IIª jaro.—**Holanda Pioniro**. *Hilversum, Holando*. Jarabono, 3 fr.
- Nov. kaj Dec. 1905.—**Tra la Mondo**. 15, Boulevard des deux Gares, *Mendon* (S. et O.) *Francujo* Jarabono, 8 fr.
- N.º 1, 2, 3 kaj 4.—**Esperanto**. *Falta* (*Rusujo*). Jarabono, 8 fr.
- Jan. 1906.—**Internacia Revuo Medicina**. 33, rue Lacedéde. *Paris*. Jarabono, 12 fr. 7, 14, 21, 28 Jan. 1906.—**Murcia**. Sociedad, 14, Murcia. Jarabono, 9 pesetoj.
- Okt Nov. 1905.—**Espero Pacifista**. 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (*Francujo*). Jarabono, 5 fr.
- 12 Nov 1905.—**El Dominical**. Marron a cuji, 43, Alto *Caracas* (*Venezuela*). Jarabono, 6 pesetoj.
- Jan. 1906.—**Unua Paŝo**. San Stefano, 26, Sofia, (*Bulgarujo*). Jarabono, 3 fr.
- Jan. 1906.—**The British Esperantist**. unuigita kun **The Esperantist**. 13, Arundel street, Strand. W. Q. *Londono*. Jarabono, 2 fr. Kun aldono literatura, 4 frankoj.
- Jan. 1906.—**Esperanto**. Papnovelde-Utca, 6, Budapest, 4. *Hungarujo*. Jarabono, 3 frankoj.

---

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

---

Grupo Rouen (Francujo) deziras ricevi dokumentojn pri propagando.

Adresu al S-ro Th. Liebard, kaŝisto de la grupo, 10 bis, rue du Pasage Dupont. Tiu sinjoro, respondos al personoj kiuj sendos al li ilustritajn poŝtkartojn pri kostumoj.

**Por la uzo de Esperanto en la konsiliĝoj de la Kongresoj de la Paco.**—La komitato de *Pacifisto*, Internacia Societo Esperantista por la Paco, petas de ĉiu esperantisto sendi al S-ro Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo) poŝtkarton laŭ la jena modelo:

«Mi subskribinta (mono, nacio, profesio, adreso) petas ke la lingvo Esperanto »povos esti uzata en la Kongresoj Universalaj de la Paco, por ke tiuj ĉi ne estu plu »fermataj al la multegaj homoj kiuj ne scias paroli la lingvojn nuntempe permesitajn.»

Ni insiste petas al ĉiuj hispanaj esperantistoj ke ili plenumu la deziron de *Pacifisto* ĉar tio estos tre utila por la disvastigo de nia kara lingvo internacia.

**Esperantista Centro Oficejo** deziras posedi la publikigitajn kaj publikigotajn gazetojn esperantistajn. Ni sendis al ĝi LA SUNO HISPANA, sed bedaŭrinde pro manko, ni ne povis adresi, la numerojn 1<sup>an</sup>, 12<sup>an</sup>, 13<sup>an</sup>, 14<sup>an</sup> kaj 18<sup>an</sup>. Ni petegas al niaj abonantoj la sendon de kelkaj el tiuj ĉi ekzempleroj se ili havas ilin superflue, al S-ro Gabriel Chavet, la sekretario, 51, rue de Clichy, Paris.